**Andreas Künzli**

# L.L. ZAMENHOF kaj Svislando – kelkaj esperantistaj epizodoj

Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917), kreinto de Esperanto, alte aprezis la Svisan Konfederacion, ne nur pro ĝiaj naturbelaĵoj, sed ĉefe pro ĝia politika koncepto: la neŭtraleco estis ideo, kiu okupis la aŭtoron de Eo dum lia tuta vivo. En responda letero al la tiama prezidanto de Svisa Easperanto-Societo (SES), Friedrich Schneeberger, kiu invitis la 2an Universalan Kongreson al Ĝenevo, Zamenhof esprimis sian plaĉon pri la propono kaj eĉ prognozis gravan rolon de la lando por Esperanto: *Kara sinjoro! Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la svisaj Esperantistoj decidis inviti la 2an kongreson en Svisujon. Tre bone, bonege! Svisujo, kiu ne havante ian nacian lingvon, estas la plej neŭtrala lando en la tuta Eŭropo, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale-homa, kaj mi esperas, ke tie ĉiuj Esperantistoj sentos sin bonege. Mi eĉ antaŭvidas iam la tempon, kiam Svisujo fariĝos la natura konstanta centro de la tuta Esperantistaro.* Kaj en letero de la 25a de oktobro 1905 al Javal Zamenhof emfazis, ke *Svisujo ĉiam estas tre bona lando por niaj kongresoj.* En sia *Deklaracio de Hilelisto,* publikigita en 1906, Zamenhof laŭdis la politikan solvon de la kvar alpaj popoloj, kiuj donis al sia ŝtato la neŭtralan „nomon hilelistan“ Svislando.

## Vizitoj de L.L Zamenhof en Svislando

Zamenhof vizitis Svislandon entute kvar fojojn.
*Unua vizito en 1905:* Revenante de la unua internacia Esperanto-kongreso en Bulonjo-ĉe-Maro (Francio), Zamenhof kaj lia edzino Klara unuafoje traveturis Svislandon. La 14an de aŭgusto je la oka horo vespere ili alvenis en Ĝenevo, en kies stacidomo ilin akceptis nemultaj samideanoj, ĉar pri lia alveno oni eksciis nur kelkajn horojn antaŭe. Inter la alkurantoj troviĝis f-inoj Borel, Edouard Mallet kaj Em. Bernard Dubois, patro kaj filo, kaj Théodore Renard, sekretario de SES kaj redaktoro de ‚Svisa Espero'. Renard gastigis la lacajn gevojaĝantojn en strato Vieux-Collège 6 (tabulo ĝis nun indikas la eventon). Dum la sekva tago - estis belega vetero - la Zamenhofoj ekskursis kun Renard ŝipe sur la Ĝeneva Lago. En Nyon/VD aliĝis al la grupo s-roj Ferrais, Fleurdelys kaj ambaŭ s-inoj Schenk el Rolle/VD, kiuj estis informitaj telegrafie pri la vizito de la majstro. Post la tagmanĝo en Ouchy/VD Zamenhof fortrajnis de Laŭzano tra Berno, kie Schneeberger kaj Feierabend salutis la paron. Schneeberger akompanis la Zamenhofojn ĝis Thun/BE, poste la majstro daŭrigis sian veturadon al Interlaken, Lucerno, Zuriko, Buchs kaj Vieno reen al Varsovio. Fotaĵo pri Zamenhof, farita en Ĝenevo, estis mendebla ĉe la redaktoro de *SE.*
*Dua vizito en 1906:* Dum la ĝeneva UK, okazinta de la 28a de aŭgusto ĝis la 1a (resp. 6a) de septembro, Zamenhof intencis prezenti al la mondo sian doktrinon pri homaranismo. Sed la organizantoj de la kongreso malrekomendis al li fari

tion. La seniluziigita Zamenhof unue reagis per hezito ĉu li entute veturu de sia germana kuracloko Bad Reinerz al Ĝenevo. Sed ĉar li volis eviti skandalon, li tamen alveturis kaj anstataŭ mencii la homaranismon laŭnome, li ornamis sian kongresan paroladon en Victoria-halo per klarigoj pri la t.n. „interna ideo de Esperanto“ kaj tiel alimaniere esprimis siajn principajn pensojn homaranismajn. Dum la ekskursa tago la 30an de aŭgusto Zamenhof veturis ŝipe al Vevey/VD, kie en la hotelo Trois Couronnes okazis festeno. En Svislando li restis almenaŭ ĝis la 1a de septembro (loĝante denove en la domo ĉe la ĝeneva strato Vieux-Collège) kaj poste reveturis tra Bad Reinerz al Varsovio.

*Tria vizito en 1909:* Dimanĉon, la 19an de septembro, revojaĝante de la barcelona UK, Zamenhof kaj lia edzino traveturis Ĝenevon, kie ili haltis dum unu horo. Multaj ĝenevaj esperantistoj atendis lin ĉe la stacidomo kaj akompanis lin en la bufedon, kie oni trinkis teon. Poste la paro forveturis en la direkto de Dresdeno.

*Kvara vizito en 1913:* En ĉi tiu jaro Zamenhof ĉeestis la 9an UK en la kazino de Berno, 24-31aj de aŭgusto. Li rezignis pri la malferma parolado, ĉar la antaŭan jaron dum la krakova UK li komunikis al la publiko, ke li ne plu deziras esti la majstro. Anstataŭis lin René de Saussure. Por la homaranismo li private varbis. La ekskurso kondukis la kongresanojn sur la Lagon de Thun al Interlaken.

En la berna kongreso Zamenhof aperis krom kun sia edzino ankaŭ kun la filino Lidia. Longan tempon ŝi rifuzis lerni Esperanton, sed por vojaĝi al Berno ŝi estis devigita lerni la lingvon kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso. Al Berno veturis ankaŭ Adamo, kiu restadis tiam en Laŭzano, kie li prezentis sian disertacion (vd. sube).

**Infanoj de Zamenhof studis en Svislando**

Kiel la patro ankaŭ la filo Adam Zamenhof (1888-1940) lernis la profesion de okulkuracisto. Sian medicinan diplomon li ricevis en la universitato de Laŭzano en junio 1912, la ŝtatan ekzamenon li trapasis en Kievo du jarojn poste. Adam fariĝis grava kaj respektinda ĉefkuracisto en la varsovia juda hospitalo Czyste kaj estis unu el la plej fruaj fakuloj, kiuj efektivigis glaŭkomajn operaciojn. Ankaŭ lia edzino Wanda Frenkel (1893-1954) edukiĝis kiel okulkuracistino per diplomo de la laŭzana universitato (en 1921) kaj komence eĉ laboris kiel asistentino de Adamo. La tria diplomito de la laŭzana medicina fakultato estis la zamenhofa filino Sofio (1889-1942), kiu ricevis la diplomon fine de 1913. Ŝi poste laboris kiel fakulino por internaj malsanoj kaj pediatrio. La postan jaron ŝi trapasis la ŝtatan ekzamenon. Longan tempon ŝi aktivis en Ukrainio, for de la familio.

**Korespondado kun svisaj esperantistoj**

Aparta ĉapitro, kiu estas tre interesa kaj atentinda ne plej laste el psikologia vidpunkto, estas la korespondado de L.L. Zamenhof kun plej diversaj esperantistoj. El ĉi tiu korespondado oni povas fari interesajn observojn pri la rilatoj de Zamenhof kun unuopaj kunlaborantoj kaj konkludojn pri la persona karaktero de la kreinto de Esperanto. Pro diversaj okazoj kaj motivoj L.L. Zamenhof interŝanĝis leterojn ankaŭ kun pluraj svisaj esperantistoj, antaŭ ĉio kun Friedrich Schneeberger, Edmond Privat, Hector Hodler, René de Saussure, Jakob Schmid, Friedrich Uhlmann, por mencii la plej konatajn kaj signifajn. El tiu korespondado mi volas ĉerpi kelkajn interesajn erojn.

**Schneeberger – de amiko al malamiko**

Peco el la korespondado kun Friedrich Schneeberger (1875-1926) pri la kvalito kaj rolo de Svislando por la Esperanto-movado estis prezentita jam supre. Pri Schneeberger mem Zamenhof ŝajne estis iom seniluziigita. En letero al Boirac de la 23a de oktobro 1905 Zamenhof plendis, ke la kongresa protokolaro de s-ro Schneeberger estas tro mallonga. Konservita estas letero de Zamenhof de la 4a de oktobro 1906 al Schneeberger, en kiu li dankis lin *en la nomo de nia afero por ĉiuj Viaj laboroj kaj en mia propra nomo por ĉiuj amikaj sentoj, kiujn vi montris al mi. (...) La kongreso Ĝeneva estis por mi granda festo, kaj mi neniam forgesos la aranĝintojn de la kongreso, la bravan Svisan Esperantan Societon kaj ĝian simpatian kaj sindone laborantan prezidanton.* Kiel Zamenhof plue skribis, en la lastaj tagoj de la kongreso *mi sentis min ne tute sana kaj tiel laca, ke mi eĉ ne memoras, ĉu mi diris al Vi adiaŭ.* Kiam eksplodis la Ido-krizo kaj kiam Schneeberger forlasis Esperanton, kion Zamenhof nature bedaŭris (en letero de la 7a de oktobro 1908 al Sebert), la tono de Zamenhof malsereniĝis. Kiam Schneeberger evidente kritikis la Bulonjan Deklaracion, Zamenhof respondis al li la 5an de decembro 1907 jene*: Kara sinjoro! La Bulonja Deklaracio estis kreita kaj akceptita ne en momento de blinda entuziasmo, sed ĝi estis antaŭe longe pripensita kaj antaŭ la kongreso publikigita en la gazetoj esperantistaj. Legu la antaŭparolon de la ‚Fundamento' kaj tiam Vi vidos, kiel malvere parolas Viaj amikoj. – Mi penas fari ĉion, kion mi povas por konservi la pacon.* Ŝajnas, ke Schneeberger daŭrigis tedi Zamenhofon per malagrablaj leteroj. Tamen, li gratulis la majstron pro lia 50a naskiĝtago, kion Zamenhof prikomentis jene: *Estimata sinjoro! Koran dankon por Via bondeziro okaze de mia 50-jara naskiĝtago! Pri la plua enhavo de Via letero mi preferas ne paroli. Kun estimo L. Zamenhof.* Sufiĉe kolera pri Schneeberger la Zamenhof fariĝis, kiam li konstatis, ke la svisa pastro disvastigas „kalumniojn" koncerne lian rilaton kun Hachette (letero de la 16a de februaro 1911 al Sebert). Tio igis Zamenhofon verki detalan klarigon pri siaj rilatoj kun Hachette, kiu estis publikigita en ‚Oficiala Gazeto Esperantisto', n-ro 8/1911. Do, la svisan kazon Schneeberger oni povas kompari iusence kun tiu de Louis de Beaufront, kiu

ludis pli malpli la saman rolon kiel nigra ŝafo de la franca flanko. Ekde tiam Zamenhof fariĝis tre malfidema pri uloj kiel Schneeberger, kio estas sentebla ankoraŭ en letero de la 12a de junio 1913 al Sebert.

## Privat – la agema kaj fidela apostolo

Kelkaj leteroj, bedaŭrinde nur tre malmultaj, al Edmond Privat (1889-1962), estas konservataj kaj publikigitaj en PVZ/Originalaro de ludovikito. Kun Privat, kiun Zamenhof menciis en pluraj leteroj al aliaj personoj, la kreinto de Esperanto ne havis problemojn, ĉar kompare kun aliaj samideanoj Privat estis nek kverelema, nek reformema, sed nepre fidela al la afero de d-ro Esperanto, kiun la vojaĝemulo vizitis plurfoje en Varsovio. Sed ĉar Privat estis ege entuziasma kaj praktike agema esperantisto, Zamenhof preferis bremsi lin, kiel oni povas observi en letero de la 9a de novembro 1907 rilate la kontraŭstarindan agadon de la [Ido-]Delegacio: *Kara sinjoro! (...) Vi atendu kelkajn semajnojn, ĉar Vi ja komprenas, ke ni devas esti tre singardaj kun nia maniero de agado, pri nia tuta taktiko ni devas antaŭe bone interkonsiliĝi kaj ĉion bone pripensi. Vi povas kompreneble tute kuraĝe komenci Vian kontraŭdelegacian agitadon, sed mi ne povas doni al Vi ian publikan kuraĝigon por tio antaŭ ol nia plano de agado estos tute ellaborita. Mian opinion vi konas bone.* Kaj li konsole klarigis al li: *Estu tute trankvila. En la historio de Esperanto estis jam kelkajn fojojn tiaj momentoj kiel nun, sed la fideleco kaj unueco ĉiam venkas ĉiujn atencojn. (...) Trankviligu niajn amikojn kaj petu ilin, ke ĉiuj trankvile daŭrigu sian laboradon kaj ili helpu al tio, ke nia kvara kongreso fariĝu granda manifestacio kontraŭ ĉiuj niaj kontraŭuloj. Sed dume faru ĉion en Via nomo, ne en mia.*
Kiam Privat vojaĝis al Usono, la sviso restis perletere en kontakto kun Zamenhof en Varsovio kaj daŭre montris sin maltrankvila pro la faroj de la delegaciaj reformemuloj. La 9an de decembro 1907 Zamenhof respondis al li per jenaj frazoj: *Kara sinjoro! Kun plezuro mi ricevis Vian unuan leteron el Ameriko. Mi deziras al Vi plenan feliĉon en Via nova loko de loĝado. Mi esperas, ke por nia afero, Via propagando en Ameriko estos tre grava kaj fruktoporta. Klarigu kaj fortikigu ĉie la principojn esprimitajn en la antaŭparolo al la ‚Fundamento de Esperanto'. – Pri la Delegacio mi ne povas ankoraŭ diri al Vi ion definitivan; post 2-3 semajnoj la afero esperreble klariĝos. Cedi mi kompreneble ne povas; sed mi esperas, ke per enkonduko de kelkaj malmultaj neologismoj (sur la principoj de la antaŭparolo al la Fundamento) ni baldaŭ pacigos la ribelantojn.* Iusence „apostolo“ Privat profitis dum sia amerika vojaĝo la okazon por flari kaj senti la interesiĝon pri Esperanto. La 13an de marto 1908 Privat ricevis de Zamenhof respondon, en kiu li vigle esprimis sian apogon pri organizado de universala kongreso esperantista: *Kara sinjoro! Kun vera plezuro mi legis Vian leteron de 22/II. La fakto, ke la gazetoj Vin nomas mia apostolo, min tute ne ĉagrenas, - kontraŭe, mi estas nur tre ĝoja, ke Via laborado estas tiel energia, ke oni vidas en Vi apostolon speciale senditan de mi. Vi estas ja efektive apostolo de nia afero, kaj mi esperas, ke Via*

*veno Amerikon estos epokfaranta por nia afero en Ameriko. Precipe ĝojigis min la sciigo, ke la Amerikanoj komprenas la internan ideon de nia afero.* Kaj en la daŭrigo: *Kiam la Amerikanoj trovos, ke venis jam la tempo por aranĝi en Ameriko universalan kongreson esperantistan, tiam mi penos nepre veni Amerikon malgraŭ la marvojaĝo, kiu certe ne estos por mi tre agrabla. (...) Se Vi estas tute certa, ke kongreso en Ameriko povos havi grandan sukceson, Vi eble povos konvinki la Dresdenan kongreson decidi por Ameriko. Mian opinion mi ne povas diri, ĉar ĉio dependas de tio, kian garantion de bona aranĝo kaj de sukceso la Amerikanoj povos doni al ni.* Fakte, en 1910 la universala kongreso de Esperanto povis okazi en Vaŝingtono, kun la ĉeesto de Zamenhof kaj ties edzino. En 1909 Privat sendis al Zamenhof sian libreton ‚Ĉe l'koro de Eŭropo', kion Zamenhof dankis la 8an de julio.
Privat sendadis al Zamenhof ankaŭ multajn aliajn aferojn. Interesan respondon Privat ricevis de Zamenhof en julio 1910: *Kara sinjoro! La tekston de Via Aŭgsburga parolado mi danke ricevis. Ĉion mi plene aprobas; nur pri ‚profesoro' mi ne konsentas: laŭ mia opinio ni devos esti tre singardaj kun ĉiaj ‚titoloj', kiuj povus senkreditigi nian aferon en la okuloj de la mondo.* Ŝajnas, ke Privat volis nomi Zamenhofon en tiu parolado „profesoro", sed la afero ne klaras. Ĝenerale Zamenhof ne ŝatis ligi sin kun hipotezoj kaj promesoj de aliaj, kiel li eksplikis al Privat en iu (sen-data) letero verŝajne el la jaro 1911. En 1912 Privat vizitis Zamenhofon en Varsovio. En letero de la 10a de januaro 1912 fiksita estis la 25a de januaro, je la 6a horo vespere por kune „tagmanĝi". Kutime, Zamenhof liberiĝis de sia laboro ne pli frue. Dum la vizito de Privat ĉe la majstro regis evidente iom streĉita etoso, kiel Zamenhof ekskuze skribis al Privat la 15an de februaro 1912: *Kara sinjoro! Mi danke ricevis Vian leteron (kaj mia edzino Vian poŝtan karton), el kiu mi kun plezuro vidis, ke Vi bonstate revenis hejmen. – Vi ne bezonas Vin senkulpigi, ĉar se mi tiam vespere estis iom ekscitita, la kulpo estas ne Via, sed mia: en la lasta tempo mi estas tro nerva.* La korespondado inter Zamenhof kaj Privat estis daŭrigata; ĉe ludovikito oni trovas ankoraŭ unu leteron (en la franca) de la 17a de junio 1915, en kiu Zamenhof plendis, ke post la publikigo de la ‚Letero al la Diplomatoj' oni *publikigis kontraŭ mia persono longan artikolon plenan je insultoj plej abomenindaj, kalumnioj kaj mensogoj,* eĉ en la varsovia gazetaro. En printempo 1915 Privat denove vizitis Zamenhofon en Varsovio, sed jam renkontis tre malsanan kadukulon, kiun morale frakasis la militaj doloroj. La plej lasta vizito de Privat ĉe Zamenhof datas de decembro 1916. Post la morto de Zamenhof Privat restis en kontakto kun la vidvino Klara, inter alie por verki la unuan biografion sub la titolo ‚Vivo de Zamenhof', kiu aperis en 1920 en Londono.

**Ĝojo kaj skeptikemo pri la ideoj de Hodler**

La unua konata letero de Zamenhof al Hector Hodler (1887-1920), filo de la svisa pentristo Ferdinand Hodler, datas de la 16a de aprilo 1907. En ĝi li konfirmis la unuan numeron de la ‚Juna Esperantisto de Ĝenevo', revueto

eldonita de Hodler kaj Privat, kun jena bondeziro: *Al Via klubo mi transsendas la plej koran saluton kaj deziron de la plej bonaj sukcesoj. Mi esperas, ke dank' al Via juna energio Via laborado alportos al nia afero la plej gravajn sekvojn.* Poste Hodler sendis al Zamenhof ankaŭ la kolekton da ekzempleroj de la jubilea numero de la revuo ‚Esperanto'. Kiam Zamenhof eksciis pri la intenco de Hector Hodler fondi Universalan Esperanto-Asocion, li skribis al Michaux la 10an de februaro 1908 jenajn liniojn: *La ideon de Hodler per si mem mi trovas bona, ĉar Vi ja scias, ke mi ĉiam diris, ke organizacio estas necesa; sed mi ne scias, ĉu nun estas oportuna tempo por paroli pri organizado, - ni eble devos lasi ĝin ĝis tempo pli oportuna. Sed mi ne miksos min en la aferon.* Sed en julio 1908, kiam Zamenhof vidis la projekton maturiĝi, li skribis al Hodler jenajn vortojn de agnosko: *Kara sinjoro! (...) La rapida kaj bonega disvolviĝo de la UEA min tre ĝojigas, kaj mi esperas de via Asocio tre multe da bono por nia tuta afero. Mi kore deziras al UEA la plej bonajn sukcesojn. Vian afablan inviton, ĉeesti en Dresdeno en la solena malferma kunveno kaj en unu el la laboraj kunvenoj de via Asocio, mi akceptas kun plezuro.* Zamenhof ĉiam denove respondis al siaj iniciatemaj disĉiploj, ke kiel publika persono li ne povas, aŭ ne rajtas, subteni privatajn entreprenojn. Unuflanke li pravis, ke li decidis ne devigi sin rilate alies privatajn aferojn, aliflanke li estis eble iom tro severa kaj tiel seniluziigis siajn kunlaborantojn. Ekzemplo de tia deklaro pri lia sinteno estas la letero de Zamenhof de la 23a de maeto 1909 al Hodler, en kiu li skribis jenon: *Kara sinjoro! Mi certe estus tre ĝoja, se la agema direktoro de la Internacia Instituto, s-ro E. Privat, havus la eblon tute dediĉi sian tempon al nia afero; sed bedaŭrinde mi persone ne multe povas helpi al tio, ĉar la Instituto estas entrepreno privata, kaj Vi komprenas tre bone ke mia situacio en la esperantista afero postulas, ke mi severe tenu min flanke de ĉia privata entrepreno, Kiel ajn utila ĝi estas kaj kiel ajn simpatia estas por mi ĝia kondukanto.* Sed aliflanke Zamenhof promesis, ke *en ĉiuj privataj interparoloj (interalie dum la Barcelona kongreso) mi volonte rekomendos Vian instituton kiom mi nur povos; sed rekomendi ĝin publike mi devas min gardi; ĉar Vi scias ja, ke niaj malamikoj ne dormas.*

Kiam Hodler volis aranĝi apartan kongreson disde la universala kongreso, Zamenhof reagis pri tio en letero de la 8a de novembro 1910 al Sebert. Pri la kongreso de UEA li opiniis, ke *ĝi devas okazi nepre kune (samtempe kaj samloke) kun nia komuna kongreso, por ke ni ne dividu niajn fortojn.* Sed Zamenhof estis kontraŭ la ideo, ke *la kotizo de UEA liberigu liajn societanojn de la kotizo ĝenerala.* Ke la UEA-kunveno povus esti speco de konkurenco por la ĝenerala kongreso, Zamenhof ne timis: *La nombro de la personoj, kiuj venos nur al UEA kaj forveturos antaŭ la komenciĝo de la ĝenerala kongreso, sendube estos tre malgranda; la ĝenerala kongreso sekve tute ne suferos de la tro frua aranĝo de la kunvenoj de UEA.* Kaj: *Aranĝi la kunvenojn de UEA post la fermo de la tuta kongreso oni povus nur en tia kazo, se s-ro Hodler ne postulos, ke oni pro tio prokrastu la ekskursojn kaj devigu ĉiujn ne-esperantianojn perdi la tempon pro UEA. – Krom la ĝenerala kongreso s-ro Hodler povas fari kun la UEA-anoj ĉion, kion li volas; sed ricevi rajtigan karton*

*kaj insignon de la ĝenerala kongreso kompreneble povas nur tiuj, kiuj pagis la ĝeneralan kotizon kaj ne faras ian malhelpon al la aliaj kongresanoj aŭ ion kontraŭan al la decidoj de la Organiza Komitato.* Ĉi tiu korespondero imprese montras du aferojn: unue UEA, du jarojn post ĝia fondo, tute ne estis konsiderata kiel ĉeforganizo identa kun la ĝenerala movado, due ke Zamenhof tro malfidis kaj suspektis iniciatojn, kiuj ne devenis de li mem. La svisa demokrato Hodler, fidante nur la strukturojn de UEA, volonte kritikis la laŭ li maldemokratajn strukturojn de la parizaj instalaĵoj ĉirkaŭ la Centra Oficejo. Zamenhof trovis la „atakojn“, kiuj lin „tre malĝojigas“, „nebelaj“ kaj komentis la 17an de junio 1912 el Bad Salzbrunn al Sebert la aktualan situacion jene: *Mi ne miras, ke troviĝas ankaŭ aliaj esperantistoj, al kiuj la agado de Hodler ne plaĉas. Sed kun malĝojo mi konstatas, ke eĉ tiuj nemultaj personoj, kiujn indignigas la agado de Hodler, riproĉas nur la manieron kaj la kaŝitan celon de la agado (lian deziron submeti la tutan Esperantan aferon al UEA), sed neniu faras ian riproĉon kontraŭ la esenco de liaj akuzoj, neniu defendas la nunan staton kaj agadmanieron de la Centra Oficejo! Kun granda malĝojo mi konstatas la fakton, ke la C.O. estas nun bedaŭrinde tre nepopulara inter la esperantistoj.* Pro tio Zamenhof postulis, ke oni donu al la afero *karakteron tute klaran,* t.e. aŭ la Centra Oficejo estu *aŭ tute privata, aŭ tute oficiala.* Hodler mortis en marto 1920 kaj la pariza Centra Oficejo, kiu laŭ ies opinio estis ankaŭ maljusta kritikata, ĉesis funkcii en 1922. La hodlera-privata UEA venkis la ‚batalon’ koncerna organizadon de la Esperanto-movado. Ankaŭ la psikosuspektemo kaj kronika malfido de Zamenhof vidalvide de alies iniciatoj (ĉar li timegis kverelojn) estis troigitaj kaj vanaj.

**Homaranismo – la plej lasta espero je la svisoj**

En 1913 Zamenhof ellaboris planon pri kongreso pri neŭtrala religio kaj publikigis prian artikolon en madrida gazeto. Malgraŭ la milito Zamenhof preparis sin por la kongreso de homaranistoj, kiu devintus okazi aŭ en 1916 en Berno aŭ en 1917 en Ĝenevo. Ĝi ne okazis, kaj Zamenhof mem mortis en aprilo 1917.
Post kiam montriĝis, ke la francoj (kaj aliaj) ne deziris apogi la homaranismon de Zamenhof, li direktis sin kun la plej lasta espero al kelkaj svisaj esperantistoj, precipe Friedrich Uhlmann, Jakob Schmid kaj René de Saussure.

Pri René de Saussure (1868-1943), frato de la lingvosciencisto Ferdinand de Saussure kaj ano de fama ĝeneva familio, Zamenhof havis la imagon, ke temas pri riĉulo (letero de la 20a de decembro 1906 al Sebert), do li havis certan esperon, ke li helpos al la esperantistoj, kion li ja ankaŭ faris. Due, dum la Ido-krizo Zamenhof kalkulis je la helpo de Saussure, ke li uzos sian prestiĝon por lukti kontraŭ la faroj de la Delegacio (letero de la 7a de aprilo 1908 al Sebert). Krome, Zamenhof proponis, ke lingvajn proponojn pri vortfarado oni sendu al de Saussure (cirkulera letero pri neologismoj al la membroj de la Esperamtista

Akademio, 1909). En 1909 de Saussure sendis al Zamenhof du ekzemplerojn de la „bela novaforma ‚Svisa Espero'", kiun la majstro „ricevis kun plezuro kaj danko". Sur unu el la ekzempleroj Zamenhof trovis apartan saluton de René de Saussure. En la sama jaro Zamenhof ricevis saluton el la urbo Soloturno, kie okazis printempa renkontiĝo de svisaj esperantistoj, en ĉeesto de eminentuloj Kiel de Saussure, Hodler, Privat, Schmid, Stettler, k.a. La postan jaron de Sausure sendis al Zamenhof sian famiĝintan analizon ‚La Construction logique des mots en Espéranto' kaj la tradukon de ‚La Devo' de E. Naville. La lingvistikan verkaĵon Zamenhof trovis „bonega" kaj rekomendis ĝian tradukon al Esperanto kun la aprobo de la Akademio. Tamen, la opinio de Zamenhof pri de Saussure ne estis sen duboj. Ekzistis pluraj kialoj ne konsideri lin kiel publikan festparolanton dum la Universala Kongreso en Berno de la jaro 1913. En letero de la 6a de aŭgusto 1913 al Sebert Zamenhof konfirmis, ke de Saussure *„kiel, prezidanto de la Kongreso ne sole estas tre bona, sed li eĉ estas la sola taŭga prezidanto,* ĉar nek s-ro Schmid nek s-ro Stettler *havus por tio sufiĉan aŭtoritatecon.* Sed por la malferma parolado ŝajnis al Zamenhof, *ke estus multe pli bone, se ĝin prenus sur sin s-ro Boirac, ĉar a) mi ne scias, ĉu s-ro de Saussure estas bona oratoro (kio estas tre grava, ĉar la parolado devas fari bonan impreson precipe sur la gravaj Svisaj ne-esperantistoj, kiuj eble aŭskultos kaj laŭ tiu parolado formos al si juĝon pri Esperanto); b) Alkutimiĝinte tro multe al la uzado de Esperanto reformita, s-ro de Saussure povas de tempo al tempo fari lingvajn erarojn, kio farus tre malbonan impreson; c) La reveno de s-ro de S. al Esperanto estas ankoraŭ tro freŝa kaj ne donas sufiĉan garantion, ke li morgaŭ denove ne ŝanĝos sian opinion; tial mi timas, ke lian paroladon multaj akceptos malvarme kaj eble eĉ malamike; d) Ĉar s-ro de S. estas nun tro multe okupita por la kongreso, tial mi timas, ke li eble ne havos sufiĉe da tempo por pripensi kaj pretigi bonan solenan paroladon.* Nu, finfine René de Saussure, kiu mirigis la esperantistojn pro sia daŭra kaj fakte sensenca lingva eksperimentemo, faris la festparoladon, kaj ĝi efektive estis iom seka kaj formala, ĉar la modesta de Saussure neniel celis superi Zamenhofon.
Poste Zamenhof kontaktis lin kiel ricevanton de longa cirkulera teksto pri la organizado de kongreso de neŭtrale-homa religio. Ĉi tian leteron Zamenhof sendis al de Sausure la 18an de oktobro 1914 kun granda deziro, sed nenia devigo senti sin honorata per lia respondo. Ne estas konate, ĉu de Saussure respondis al tiu iniciato de Zamenhof, tamen jesan indikon pri tio ni posedas. La plej lasta elpaŝo pri tiu temo antaŭ la morto de Zamenhof estis letero de la 15a de februaro 1917 al la germana esperantisto Schiff kun la peto sendi al de Saussure la germanan tradukon de la homaranisma teksto (versio de 1917), kiu „laŭ sia promeso al mi" tradukos la artikolon en la francan lingvon kaj ambaŭ versioj, t.e. germana kaj franca, presigos kaj dissendos al ĉiuj gazetoj de la mondo.
Por la organizado de la homarana kongreso Zamenhof pensis pri Jakob Schmid (1869-1955), kiu loĝis en Berno kaj ĉar li estis kompetenta aranĝinto de la berna Universala Kongreso en la svisa ĉefurbo. Jam en oktobro 1907 Zamenhof havis

skriban kontakton kun Jakob Schmid, kiam li donis sian konsenton pri aperigo de fotografaĵo en „Tobler Esperanto-ĵurnalo“.
La 28an de septembro 1913 Zamenhof varme dankis al Schmid pro la farita laboro en Berno: *Kara sinjoro! Reveninte hejmen kaj rememorante nun la belajn tagojn de Berno, mi sendas al vi mian koran gratulon pro la bonega aranĝo de la kongreso. Vi multege laboris, sed vi povas almenaŭ diri al vi, ke via laboro ne perdiĝis vane. Ĉu vi nun jam iom ripozis ? En la ĉambro de nia hotelo en Berno*[1] *kuŝis bela kuseneto kun verda stelo kaj la vortoj: ‚En la mondon venis nova sento'; ĉar neniu ion diris al mi pri tiu kuseneto, tial mi pensis, ke ĝi estas apartenaĵo de la hotelo. Nur en la momento de nia forveturo la hotelmastro diris al mi, ke la kuseneto estas destinita por mi, sed li ne diris, kiu ĝin alsendis. Supozante ke la donaco venas de fraŭlino via filino, mi petas volu transdoni al ŝi plej koran dankon de mia edzino kaj de mi. (...)* Ŝajnas, ke Schmid promesis al Zamenhof pripensi engaĝiĝon en la homarana kongreso, sed laŭ li estis tro frue kunvoki ĝin. Tial Zamenhof skribis la 11an de junio 1914 al li la jenan leteron: *Kara sinjoro! Mi ricevis vian leteron de 27/V kaj mi dankas vin kore pro via penado por la kongreseto de Homaranoj. Mi tute konsentas, ke ni atendu. Eĉ se troviĝos nur 20 partoprenantoj, ni povos aranĝi la kongreseton en Berno, sed ... se tiuj 20 personoj efektive kaj propramove havos sinceran intereson por la homaranismo. Sed se ĝis la fino de Julio promesos veni nur malmultaj personoj, kiuj volos veni pro scivoleco, ĉar ili loĝas proksime de Berno, aŭ ĉar oni forte agitis kaj forte petis ilin, tiam eble estos pli bone, ke ni ne aranĝu la kongreseton en Berno. Cetere ni povas atendi kaj la finan decidon ni faros en Parizo. Tial por mi estas tre interese, scii, kiuj estas la personoj, kiuj aliĝis. Ni devas nur peni, ke la esperantistoj sciu pri la kongreseto; sed perforte varbadi ni, laŭ mia opinio, ne bezonas; ĉar mi ripetas, ke laŭ mia opinio estas pli grave havi nur 20 partoprenantojn, kiuj havas intereson por la afero, ol 50 partoprenantojn indiferentajn. Personoj, kiuj mem ne havas en sia koro la homaranismon, prezentus por ni nur malhelpon, ĝenus la liberecon de nia diskutado kaj malfaciligus la akcepton de iaj decidoj.*
Ŝajnas, ke Schmid ne plu respondis, pri kio Zamenhof plendetis la 29an de junio 1914, ĉar restis malmulte da tempo por prepari la kongreson.
Pro tio Zamenhof skribis al Friedrich Uhlmann (1881-1938), alia svisa esperantisto, kuracisto, redaktoro de la ‚Homaro' kaj framasono, kun la peto ke li transprenu la aferon, la 8an de septembro 1914: *Kara kolego! La terura milito, kiu nun faras tian grandan ekstermadon inter la homoj, instigas min, ke mi – malgraŭ la ĝisnuna malbona sukceso – nepre penu aranĝi kongreson de homaranoj. Mi deziras aranĝigi tion en somero 1915 kaj inviti al ĝi ne sole esperantistojn, sed ankaŭ ĉiujn homojn, kiuj deziras unuiĝon de la homaro. Sed ĉar aranĝi tion en mia lando kaj sub mia nomo estas absolute nefareble, tial mi serĉas nun alian personon, kiu volus preni sur sin la aranĝon de la kongreso. Antaŭ ĉio mi kompreneble devis min turni al s-ro J. Schmid. Sed ĉar post longa*

[1] Temis pri la pensiono Beau-Site.

*pripensado mi decidis ŝanĝi la lastan paragrafon de la Deklaracio (...), kaj ĉar mi supozas, ke ĉe la nuna formo de la Deklaracio s-ro Schmid (kiel kredanto katolika) verŝajne ne volos labori por la homaranismo, tial mi petas Vin, volu min sciigi, ĉu, en okazo de rifuzo de s-ro Schmid, Vi ne povus preni sur Vin la aferon, aŭ ĉu Vi ne povus rekomendi al mi ian alian fidindan personon, al kiu mi povus proponi la aferon ? La plano de agado povas esti pli-malpli jena: 1) La aranĝanto (kiu kompreneble devas esti persono kun ia socia situacio) devas elserĉi al si kelkajn helpantojn kaj fondi kun ili la ‚Organizan Komitaton' (almenaŭ unu el tiuj helpantoj devas loĝi en tiu urbo, kiu estos elektita kiel loko de la kongreso). 2) La komitato devas eldoni kiel eble plej baldaŭ (en la lingvoj angla, germana, franca kaj Esperanto) invitan prospekton pli-malpli similan al tiu, kiun eldonis s-ro Schmid, kaj tiu prospekto devas esti dissendita al 5000 plej gravaj gazetoj de la mondo kaj al 5000 plej eminentaj personoj en la mondo scienca ktp. (...). 3) La monon, kiu estas necesa por la presado kaj dissendado de la prospektoj, mi pruntos al la Komitato el mia poŝo, sed ĉar mi ne estas homo riĉa, tial mi kompreneble povas doni tiun monon nur prunte, kun la kondiĉo, ke la Komitato poste repagu al mi, se la ricevitaj kongresaj kotizaĵoj tion ebligos. Volu sciigi min, ĉu Vi deziras preni sur Vin la aranĝadon de la kongreso. Ĉar en la nuna milita tempo korespondado letera daŭras tro longe (kaj ni ne povas nun perdi tempon), tial volu respondi al mi telegrafe. Vi povas telegrafi nur unu vorton: ‚jes' (se Vi prenas sur Vin la aferon) aŭ ‚ne' (se Vi ne volas preni). PS En la okazo, se Vi ne povas preni sur Vin la aranĝadon de la kongreso, mi petas Vin – se tio ne estos malagrabla por Vi – volu fari jenon: fari kelkajn kopiojn de mia nuna letero kaj dissendi ilin al kelkaj personoj, pri kiuj Vi supozas, ke ili volos preni sur sin la aferon (eble al d-ro Cristen, s-ro Stettler aŭ aliaj?). Se iu el ili konsentos preni sur sin la aranĝadon de la kongreso, mi petas, ke li telegrafu al mi la vorton ‚akceptas'.*

Ĉar en 1914 eksplodis la unua mondmilito, por la organizado de ajna kongreso okazo ne plu aperis. Kaj Zamenhof kaj kun li la iluzio pri la homaranismo, kiun neniu deziris adopti, forpasis en aprilo 1917.